Esperantic Studies Foundation

Esperantic Studies Foundation (ESF) laboras por progresigi komprenadon kaj praktikadon de lingva justeco en multkultura mondo kaj celas disvolvi kaj subteni altnivelan agadon pri esplorado, edukado, kaj interlingva komunikado. Ĝiaj prioritatoj kaj valoroj formiĝas kadre de daŭra engaĝiĝo kun la monda Esperanto-komunumo, kiel ankaŭ kun esploristoj, edukistoj kaj aktivuloj sur multaj prilingvaj kampoj.

La prioritatoj de ESF ĉirkaŭas la jenaj tri kampoj:

> Esplorado: ESF laboras por instigi kaj faciligi publikigon kaj publikan diskutadon pri interlingva komunikado kaj interlingvistiko, lingva justeco, lingvo-politiko kaj -planado, kaj la fenomeno de Esperanto.

> Konservado: ESF laboras kun bibliotekoj, organizoj kaj individuoj por konservi valorajn dokumentojn, antikvaĵojn kaj objektojn, kiuj atestas je la riĉa historio de la fenomeno de Esperanto kaj la pli vasta kampo de interlingvistiko ĝenerale.

> Edukado: ESF antaŭenigas la studadon kaj instruadon de Esperanto kaj interlingvistikon precipe je universitata nivelo, proponante subtenon por ĉeestaj kaj virtualaj kursoj, kaj subtenon por la kreado kaj konservado de interretaj edukaj rimedoj.

ESF subtenas kaj stimulas aktivadon de siaj celoj per stipendioj kaj premioj

Ni havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno

Premio: CALICO

***Informilo por Interlingvistoj* estas senpaga kvaronjara bulteno por ĉiuj, kiuj volas informiĝi pri novaĵoj kaj evoluoj en la kampo de interlingvistiko. Kontaktu nin se vi deziras ricevi ĝin regule.**

Kontaktu nin!

Akademia kunordiganto: angela.tellier@esperantic.org

Ĉefdirektoro Charles Mays: admin@esperantic.org